

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2009/2 (decembro 2009)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

### 1. KUNSIDO

Dum GEK/EEK okazis la jarĉefkunsido de AGEI. Estis traktitaj la buĝeto, raporto pri eventoj en 2008, agado de ILEI, ktp. Ĉiuj gravaj dokumentoj estas videblaj sur la hejmpaĝo de AGEI (<http://esperanto.de/agei>)

En 2009 AGEI daŭre estas la plej multnombra landa sekcio de ILEI kun 82 membroj.

Dum GEK multaj programeroj estis organizitaj rilate al instruado (vidu apartan liston). Ili estas videblaj ankaŭ sur la kongresa hejmpaĝo <http://gek-EEK.esperanto-urbo.de>

### 2. KONFERENCO

La 42a ILEI-Konferenco (17-25.07.2009 okazis en Krakovo (PL), ĝia ĉeftemo estis: La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado. AGEI estis reprezentata de Zsófia Koródy, la aliaj komitatanoj: Rudolf Fischer, Christof Krick, Harald Schmitz kaj Wolfgang Bohr ne povis ĉeesti.

Zsófia Kóródy ankaŭ havis du prelegojn dum la konferenco: pri instruista trejnado en Herzberg inspirita de profesoro Istvan Szerdahelyi kaj pri vivo en Herzberg – la Esperanto-urbo.

En la konferenco estis elektita nova ILEI-estraro:

Prezidanto: Stefan MacGill, Nov-Zelando/Hungario. Eksteraj rilatoj, kunordigo

Vic-prezidanto: Duncan Charters, Britio/Usono, Universitata agado, instru-teknologia evoluo

Sekretario: Małgorzata Komarnicka, Pollando/Germanio

Estrarano pri Financoj: Julija Batrakova, Rusio/Nederlando

Estrarano: Radojica Petrovic, Serbio, Edukaj projektoj, informa agado

Estrarano: Zsófia Kóródy, Hungario/Germanio, Ekzamenoj, Esperanto-centroj, instrukapabligo

Estrarano: Julián Hernandez, Kubo, Lerneja kaj landa agado

La nova estraro energiplene eklaboris, multon faras por ke la planoj, la agado estu travideblaj, buĝeto, laborplano, gravaj decidoj publike akireblaj, konsulteblaj. Novaĵojn oni ofte trovas sur la konstante refreŝigata hejmpaĝo de ILEI: <http://ilei.info>. Ankaŭ la jarraporto de AGEI estas videbla tie.

3) Konferenco 2010: Sur la hejmpaĝo vi trovas informojn kaj aliĝilon por partopreni en la ILEI-konferenco en 2010 en Matanzas, Kubo!

### 4) KONGRESO

Zsófia Koródy, prezidanto de AGEI, partoprenis en UK en Bjalistoko (PL). Ŝi deĵoris ĉe la AGEI-tablo en la Movada Foiro, prelegis en la Tago de Lernejo (titolo: Ne nur virtuala amikeco – Comenius projekto kaj ĝemelurbaj kontaktoj de lernejoj en Herzberg). Ŝi kontribuis ankaŭ al la simpozio omaĝe al Istvan SZERDAHELYI (1924-1987) iama profesoro en ELTE Universitato Budapeŝt, Hungario, prezidinto de ILEI. Temo de la prelego: Instrui kvalite kaj kvalifikite.

### 5) INSTRUADO:

5.1 Lerneja: ĝojigas min, ke mi povis raporti pri 15 oficialaj lernejoj kaj instituciaj E-kursoj en la lernejararo 2008/2009. Sur la paĝaro de [edukado.net](http://edukado.net) vi trovas trovi ĉiujn informojn pri tiuj lernejoj, universitatoj. Gratulojn al la instruistoj!

Mi petas ĉiujn gekolegojn: bonvolu aktualigi ĉe [edukado.net](http://edukado.net) la informojn pri tiuj lernejoj en la lernejararo 2009/2010, kaj aldoni (se estas) viajn novajn kursojn. Bv. informi min ankaŭ, se vi scias pri iu nova grupo, kiu ne estas ankoraŭ en la listo! En la laŭlanda listo de lernejoj Germanio estis en la unua loko en 2009!!

5.2 Eksterlerneja: mi gratulas ankaŭ al aliaj gekolegoj, kiuj foje-foje raportas pri sukcesa varbado, eksterlerneja, popolaltlerneja kurso, ktp.

Bonvolu sendi raportojn, informojn pri via instrulaboro: via ekzemplo, viaj spertoj, rezultoj, ktp. povas esti tre utilaj, helpaj al aliaj. Kelkajn vi trovas sur la hejmpaĝo de AGEI  
<http://esperanto.de/agei>

6) KLERIGAGO, PLUKLERIGADO: GEC/ICH daŭre ofertas la t.n. studsesiojn kaj strebas je kvalifikado de E-instruantoj, instruistoj. La sekva Studsesio (pri Zamenhof, literaturo) okazos inter 11-13.12.2009 en Herzberg am Harz, la 12an vi povas partopreni la tradician jarfinan klubvesperon! La Studsesiojn ni aparte rekomendas al junaj instruemuloj, kiuj povas peti kaj ricevi de GEJ subvencion por la veturkostoj.

6.1 TORPEDO 5: 9-12.10.2009 estis bonsukcesa, jubilea renkontiĝo kun multaj interesaj fakprelegoj, praktika metodika helpo de Stefan MACGILL, Zsófia KÓRÓDY, Katalin KOVATS, Gerald TUCKER, Peter ZILVAR, Peter BALAZ, Jevgenij GAUS kaj pluraj aliaj spertaj gekolegoj. Kiel daŭrigo inter 12-17 Aldoniĝis al ĝi trejnado de instruantoj el la tn. tria aĝo el Pollando kaj Slovakio enkadre de komune ellaborita Grundtvig -projekto  
Ĉeftemoj: historio de instrumentadoj, adaptado de metodoj al novaj kondiĉoj, instrumaterialoj, instruhelpiloj, aŭtoroj prezentas sian lernmaterialon, KER-ekzamenoj, kiel instrui akuzativon, kiel instrui el la libro de Stano Marcek, andragogio, interreto kaj instruado, spertintersanĝo, ktp. Estis aparte sukcesa semajno kun bona etoso kaj studemo.

6.2 PROJEKTOJ: Jen raportoj pri kelkaj sukcesaj projektoj de ICH (pli detale kun aldonaj materialoj ĉe <http://esperanto-urbo.de>)

1. Ĝemelurba projekto: en 2009 la 4-an fojon okazis renkonto de ĝemelurbaj lernejoj el Herzberg kaj Góra. 8 personoj venis al la GEK/EEK dum kiu okazis aparta programo por la junularo. La polaj infanoj ricevis subvencion de Pol-Germana Fondaĵo. Alia renkontiĝo eblis dum IIK en Pollando paralele kun UK. El Herzberg partoprenis 3 gelernantoj dank' al subvencio ricevita de Gian Carlo Fighiera kaj Fondaĵo Mondo. Ĉiuj partoprenoj estis tre utilaj por la lernantoj,, ni esperas, ke ĉiujare ni trovas subvenciantojn por tiu celo!

2. Comenius-projekto: por 2 jara projekto (2008-2010) estis gajnita EU-subvencio. La kunlaborantaj lernejoj estas el 3 landoj: Springboard lernejo en Bar Hill, Cambridge, bazlernejo el Miskolc, Hungario kaj bazlernejo el Herzberg. La celo de la projekto estas konsciigi la infanojn pri lingvaj kaj kulturaj diversecoj. La subvencio ebligas reciprokajn vizitojn unu al la aliaj. En aprilo 2009 8-10 jaraj infanoj kun siaj gepatroj kaj instruistoj partoprenis 5 tagan viziton al Britio kaj en oktobro 2009 lerneja delegacio veturis al Hungario. Ambaŭ vizitoj estis tre sukcesaj, la infanoj bone amikiĝis kaj prezentis belajn teatraĵojn, kantojn, ktp. en Esperanto.

En aprilo 2010 la britaj kaj hungaraj partneroj venos al Herzberg por la lasta renkonto, por la fina akto de la Comenius-projekto. Detalojn, fotojn, filmojn vi trovas sur la paĝo: <http://esperanto-urbo.de/Projektoj>

3. Grundtvig-projekto: Granda sukceso estas por instrukapabligo, trejnado de Esperanto-instruantoj, instruistoj, ke kadre de Grundtvig-projekto, ene de la t.n. 'Dumviva lernado' programo de EU, estis akceptita la du-jara kunlaborplano ellaborita de Pola Esperanto-Asocio (PL), E@I (SK) kaj Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg GEC/ICH (DE). La trilanda projekto por Esperanto-instruado celas instrukapabligon, metodikan trejnadon por instruantoj, kursgvidantoj por la pli maljuna generacio, la t.n. Tria Aĝo (55+). La projektintoj ricevas subvencion de EU por ebligi al kursanoj partoprenon en klerigado, seminario en la partnerlandoj.

La trejnado okazis dum kaj post Torpedo-5 (9-17 Septembro). Krom lingva perfektigo la kursanoj aŭskultis prelegojn pri instrumentadoj, Esperanto-gramatiko, literaturo kaj kulturo, andragogio, ktp. Post 2-jara studado kaj plenumo de ĉiuj kondiĉoj, ili povos ricevi ILEI-diplomon pri instruado.

6.3 PLANOJ: ni ŝatus instigi ĉiujn, serĉi similajn eksterajn subvencifontojn por pli vasta, pli bone realigebla instruagado. Estas multaj internaciaj projektoj, kies celoj bone kongruas kun nia celaro. Indas serĉi ilin, engaĝiĝi, trovi partnerojn por kunlaboro kaj montri ankaŭ al aliaj, neesperantistaj instancoj, ke Esperanto estas viva, subteninda. Estas planate organizi specialan seminarion en Herzberg en oktobro projektebloj, subvencipetado, ellaboro de internaciaj kunlabor-formoj. Ĝi gravas ne nur por germanaj E-instruistoj sed ankaŭ por la internacia kolegaro, do estas petita aŭspicio kaj subteno de ILEI.

Subaze de la multflanka agado de Interkultura Centro Herzberg kaj la multnombra landa sekcio AGEI, estas oferto al ILEI konsideri la sidejon de AGEI kiel konsantan internacian klerig- kaj edukcentron (kursoj, seminarioj, ekzamenoj, biblioteko kun pedagogia-metodika fak Kolektaĵo, multe da faka helpo).

## 7. EKZAMENOJ

7.1 La novaj UEA-ekzamenoj (B1, B2, C1 niveloj) laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro estas tre ŝatataj, jam pli ol 100 kandidatojsukece trapasis ilin kaj ricevis sian diplomon.

La sekva sesio okazos en Germanio (evt. en Pollando) dum la grandaj jarfinaj renkontiĝoj.

Aperis libro kun du serioj de provekzamenoj: Esperanto de nivelo al nivelo. Bv. mendi de Zs. Korody (10 eur+sendokostoj).

ALIĜO al la EKZAMENO dum IF kaj NR eblas ankoraŭ. Bv. peti de mi aliĝilon, menciante la nivelon, kiun vi elektis.

7.2 UEA/ILEI ellaboris regularon por ekzamenoj por blinduloj. Ĝi estis akceptita de la du komitatoj. La unua sesio en 2011 okazos en Kopenhago dum UK.

## 8. ALVOKOJ, INFORMOJ, MEMBRECO:

La AGEI-membrokotizo (kun abono de IPR), aliĝkondiĉoj ne ŝanĝigis por 2010. Bonvolu mem renovigi vian membrecon se vi ne donis enkasigrajton.

Abonu la gazeton Juna Amiko! Por vi, viaj gekolegoj, viaj kursanoj. Ĝi kostas nur 14 eŭrojn ankaŭ en 2010.

La nova hejmpaĝo de AGEI (<http://esperanto.de/agei>) enhavas ĉiam pli da informoj Bv. ofte viziti ĝin!

AGEI bezonas novajn, junajn membrojn. Bv. helpi novajn instruemulojn por trovi nian asocion. Ni dankas al ĉiuj niaj membroj pro la fidela, daŭra membreco, kaj deziras

AGRABLAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON!

Multajn salutojn de :

Zsófia KÓRÓDY  
prezidanto de AGEI  
estrarano de ILEI